

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj 2³/₁₂.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 6 (42)

la 30:an de septembro 1899

IV:a jaro.

Al esperantistoj finlandaj.

Ĉiutage ni vidas kaj aŭdas, kiel energie kaj varme oni laboradas kaj propagandas en aliaj landoj por nia kara lingvo internacia, kaj ke Esperanto tie faras progresojn grandegajn, sed ni, ni devas ĝin konfesi, ke ni ĝis nun faris — nenion.

Tial ni devas maldormiĝi de nia apatio kaj kun fortoj novaj kaj kunigitaj fari ion por nia grandega lingvo, kiun, mi ĝin scias tre bone, ni ĉiuj amas multege kaj al kiu ni kompreneble deziras la plej bonan sukceson. Sed oni ja ne povas fari sukceson sen laboro, tial ni ankaŭ devas labori kaj, ĉar laboro kunigita estas multe pli facila kaj plej ofte ankaŭ pli fruktoporta, mi proponas, ke ni formu kunligiĝon inter esperantistoj finlandaj, — kunligiĝon, kies unuaj kaj solaj statutoj estas publikataj tie ĉi. La obeado je ili dependas nur de reciproka konsento kaj amo al la kuna celo.

Jen mia propono:

1:e. La celo de la ligo estos propagandi kaj publiki konadon pri Esperanto.

2:e. Ĉia membro ĉiujare oferos 5 markojn al la ligo.

3:e. La membroj inter si elektos estron kaj sekretarion-kasiston.

Por atingi nian celon, t. e. por propagandi kun sukceso, mi proponas: ke ni aĉetu ian aparaton por plimultigo de skribaĵoj, ekzemple "Ciklostilo Aŭtomata" (kosto ĉ. 150 mkj) aŭ ian alia aparaton oportunan;

ke ni kun ĝia helpo presu skribaĵojn propagandajn, kiujn ĉia membro kun sia plej bona povo penadu disdoni tien kaj ĉien;

ke ni aĉetu lernolibrojn kaj vortarojn por vendi kaj broŝurojn propagandajn por doni al tiuj personoj kiuj deziras;

ke ni formu bibliotekon aŭ rondeton literaturan, el kiu ĉia membro de nia ligo senpage ricevos por legi ĉiajn verkojn esperantajn, t. e. ke li pagas

nur poŝtpagon kiam li, en sia vico, sendos ĝin al iu sekvanta membro nomata. Tio ĉi estus, laŭ mia opinio, tre grava, ĉar ni ne havas okazon ekzercadi lingvon internacian en alia maniero ol literature. (Tamen mi varme rekomendas al ĉia esperantisto mem aboni gazetojn esperantajn kaj aĉeti esperantajn librojn tiel multajn kiel eble, ĉar nia devo estas per tio helpi la movadon esperantan.) Mi havas sekvantajn verkojn esperantajn:

1) Ŝtona gasto de A. Puŝkin, 2) Hamleto de V. Ŝekspir, 3) Iliado de Homero, 4) La Slavoj de P. Milukov, 5) Aŝik-Kerib de M. Lermontov, 6) El la vivo de Esperantistoj de V. Stankieviĉ, 7) Nevola mortiginto de V. Devjatnin, 8) Unua Brandfaristo de L. N. Tolstoj, 9) Kvar tagoj. Attalea princeps de V. Garŝin, 10) Boris Godunov de A. Puŝkin, 11) Dio ĉiam veron vidas sed ne tuj ĝin aperigas de L. N. Tolstoj, 12) En la brikejo de J. Wasniewski, 13) Du Mirrakontoj de Otto W. Zeidlitz. Kaj ilin mi tre volonte oferas al nia estonta ligo esperanta.

Ankaŭ aliaj manieroj ekzistas por propagandi, kaj mi petas, ke Vi, sinjorinoj kaj sinjoroj, malkaŝeme diru viajn opiniojn pri la rimedoj kaj kiuj el ili estas plej bonaj.


Se multaj membroj raportigis al nia ligo, nia ekonomia situacio estus kompreneble pli bona, kaj tiam ni povus labori por eldono de la esp.-finna vortaro, kiu jam estas verkita per la zorgo de la Societo "Espero" en Peterburgo, sed ne presita, kaj poste por ellaborado kaj eldono de la lernolibro kaj vortaro finna-esp., kio ja estas tre grava afero kaj en mia opinio tute honorafero por ni, esperantistoj finlandaj.

Per unu vorto: ni kunligu nin kaj faru ĉion, kion ni povas, por nia afero en Finnlando, kaj ni ĉiam memoru la proverbon malnovan "Konsenteco donas forton" kaj skribu ni en nia standardo: "Progresado estas Vivo"!

Sinjorinoj kaj sinjoroj! Se vi aprobas mian proponon kaj deziras formi ligon esperantan, mi petas Vin sciigi min pri tio kaj samtempe diri viajn opiniojn, kiel ni propagandu. Kiam mi akceptos respondojn atenditajn mi raportos pri la rezultato en L. I. (aŭ letere).

Estimege

Aug. Th. Laurén
en Kannus.



Novajoj.

La Redakcio de l' pariza gazeto ĉiumonata "La Lyre Universelle" al ni sciigas, ke ĝi almetis la lingvon internacian Esperanto en la nomaron de la lingvoj, en kiuj la abonantoj de la dirita gazeto povas skribi artikolojn. La kosto de l' abono estas 6 frankoj por la tuta mondo kaj permesas senpage skribi pri ĉia afero, en prozo kaj versoj. Oni adresu siajn ordonojn al s-ro P. Berthelot, esperantisto. 70, Str. Gay-Lussac. Parizo. Francujo.

La Lyre Universelle estas la vokorgano de la Societo "*Le Salon Lamartine*", kiu enhavas ĉiujn grandajn nomojn de la franca literaturo kaj scienco, — kiel Mistral, Theuriet, Flammarion, F. Coppée, Ledrain, Cl. Hugues, Kardinal' Perraud, Maurice Bonchor, General' Paimentier k. c., k. c.

Krom tio, ke la ĉef-redaktoro de tiu ĉi pariza gazeto proponas publikigi en sia folio artikolojn pri kaj en Esperanto, li eĉ intencas aranĝi paroladojn pri Esperanto en la kunvenoj de la Societo *Le Salon Lamartine*.

Sekve: unu nova aliĝo al nia afero inter la gazetaro. Ni esperas bonan sukceson de la entrepreno.

* * *

Oferoj. Unu sveda esperantisto, s-ro Ellert Johnson, kiu en ripetitaj okazoj apogis la propagandon de la Klubo Esperantista en Upsala en tre malavara kaj efika maniero, por helpi al la pago de presado de la dua eldono de l' sveda-esperanta vortaro, transdonis al la Klubo la sumon da 100 kronoj kiel prunto por esti repagota tiam, kiam la Klubo enspezis per vendado de libroj la sufiĉan monon.

Ni jam sciigis en la antaŭa numero, ke la dirita libro estas nun en presado, kaj estos aĉetebla en la mezo de oktobro kredeble. Sendube tre bonvena sciigo por niaj svedaj kaj finnaj amikoj.

* * *

El tiu laste nomita lando ni ricevas bonajn sciigojn esperantistajn. Nia amiko kaj kumbatalanto Laurén en Kannus elvolvas energian agadon helpata de s-ro Sunell. Ili efektive *laboras* por varbi adeptojn de Esperanto. "Inter aliaj varbitaj", skribas al ni s-ro L., "sin trovas la poeto-verkisto G. von Numers kaj lia filo (studento). La maljunulo N. skribis hieraŭ: — Esperanto estas treege belsona kaj tre facile lernita, sendu nepre tuj unu sveda-esperantan vortaron. — Sekve mi estis devigita lasi lin ricevi la malnovan, disŝiritan libron de mia bopatro! — Plu unu gimnazia instruisto s-ro F. en N., bona lingvisto, — havas la finnan lingvon patra, — ĉarmita pri Esperanto, promesas verki finnan gramatikon de Esperanto tiam kiam li nur estos penetrinta sufiĉe en Esperanton. Kaj multaj aliaj ankoraŭ, — sed al la plej multaj mankas vortaroj tiel ke ili eĉ ne havas eblon legi la "Lingvon Internacian" k. t. p. —


* * *

La amikojn de Esperanto kaj de L. I. ni petas tre insiste, ke ili volu agadi por la plej vasta konigo de nia gazeto kaj varbi abonantojn. La 15-an de septembro skribis al la redaktoro el la Ekspedejo en Luleå la eldonanto interalie: "La abonado ne ŝajnas ricevi ian pli grandan rapidon. Precipe rilate al Rusujo kaj Francujo tre malgrandeta nombro da personoj ŝajnas ĝis nun helpi nin per unurubloj kaj poŝtaj asignoj."

Ĉu ili rifuzis nin?

* * *

Pri Esperanto parolis. La hungara gazeto "*Tanulók Lapja*" (Gazeto de studentoj) havis en sia 45 kaj 46-a numero (1898) artikolon titolitan: *Az "Esperanto" világnyelv* (La mondlingvo Esperanto), kiun verkis fraŭlino M. I. Györke. La aŭtoro parolas unue pri la afero de mondlingvoj kaj klarigas ĝiajn malfacilaĵojn kaj kiel veran solvon de la lingvo internacia ŝi donas: la Esperanton. Plu ŝi diras, ke la mondlingvo ne volas mortigi la naciajn literaturojn, sed nur faciligi la internacian komuniĝon. Poste la aŭtoro sciigas la legantojn pri la Esperanta literaturo kaj donas malgrandan gramatikon de Esperanto.



Karma.*

De L. N. Tolstoj.

Pandu, riĉa juvelisto de la bramana kasto, veturis kune kun sia sklavo Benareson. Renkontinte sur la vojo monaĥon de bona vido, kiu iris ankaŭ laŭ tiu sama direkto, li ekpensis: "Tiu ĉi monaĥo havas noblan kaj sanktan vidon. Kuniĝo kun bona homo alportas feliĉon; se li iras ankaŭ Benareson, mi invitos lin sidiĝi en mian kaleŝon." Kaj, salutinte al la monaĥo, li demandis lin, kien li iras, kaj eksciiginte, ke la monaĥo, kies nomo estis Narada, iras ankaŭ Benareson, li invitis lin en sian kaleŝon.

— Mi dankas vin por via boneco, — diris la monaĥo al la bramano, — mi efektive elturmentiĝis de la daŭrigita piedirado. Ne havante propraĵojn, mi ne povas vin rekompenci per mono, sed eble mi povos vin redanki per ia spirita trezoro de la riĉeco de sciencoj, kiujn mi akiris, sekvante la instruadon de Sakia Muni, la feliĉa kaj granda Budĥo, la instruisto de la homaro. Ili veturis kune en la kaleŝo, kaj Pandu kun plezuro aŭskultis la instruantajn paroladojn de Narada. Post unu horo da veturado, ili atingis tian lokon, kie la vojo estis disfosita en ambaŭ flankoj, kaj vilaĝana veturilo kun rompita rado baris la vojon.

Devala, la posedanto de la veturilo, veturis Benareson, por vendi sian rizon, kaj rapidis akceli ĝis la dua tago matene. Se li malfruigus la tagon, la aĉetantoj de rizo povus jam forveturi el la urbo, kolektante jam la necesan kvanton da rizo. Kiam la juvelisto ekvidis, ke, se la veturilo ne estos forigita de la vojo, lia kaleŝo ne povos traveturi, li koleriĝis kaj ordonis al sia sklavo, Magaduto, fortreni la veturilon sur la flanko, tiel, ke la kaleŝo povu traveturi. La vilaĝano ne lasis tion ĉi fari, ĉar la veturilo staris tiel proksime al la defalo, ke ĝi povis disŝutiĝi, se oni tuŝos ĝin, sed la bramano ne volis eĉ aŭdi la vilaĝanon kaj ordonis al sia servanto deĵeti la veturilon kun la rizo. Magaduto, neordinare forta homo, trovanta plezuron en la suferadoj de homoj, obeiĝis, antaŭ ol la monaĥo povis defendi la vilaĝanon, kaj forĵetis la veturilon. Kiam Pandu traveturis kaj volis daŭrigi la vojon la monaĥo desaltis de la kaleŝo kaj diris:

— Pardonu, sinjoro, por tio, ke mi forlasas vin. Mi dankas vin por tio, ke vi estis tiel bone kaj permesis al mi veturi en via kaleŝo dum unu horo. Mi estis laca, kiam vi sidigis min, sed nun, danko al via bonanimeco, mi jam ripozis. Ekkoninte en tiu ĉi vilaĝano la korpigo de unu el viaj prapatroj, mi ne povas vin pli bone rekompenci por via boneco, ol helpi al tiu ĉi homo. La bramano ekrigardis per miro la monaĥon.

— Vi diras ke tiu ĉi vilaĝano estas la korpigo de unu el miaj prapatroj. Tio ĉi ne povas esti.

— Mi bone komprenas, — respondis la monaĥo, — ke vi ne scias tiujn kunmetitajn kaj grandajn ligojn, kiuj kunigas vin kun la sorto de tiu ĉi vilaĝano. Sed de blinda homo oni ne povas atendi ke li ekvidu, tial mi domaĝas por tio, ke vi malutiligas al si mem kaj mi penas defendi vin de tiuj vundoj, kiujn vi pretiĝas fari al si. La riĉa komercisto ne kutimis, ke

* Karma signifas budha religio, kiu konsistas en tio, ke ne sole la karaktero de ĉiu homo, sed lia tuta sorto en la nuna vivo dependas de la agadoj en la antaŭirinta vivo kaj ke la bono aŭ malbono de nia estonta vivo tiel same dependos de tiuj niaj penoj, eviti malbonon kaj akiri bonon, kiujn ni faris en tiu ĉi vivo.

Rimarko de la tradukinto.

oni riproĉu lin; sentante, ke la vortoj de la monaĥo, kvankam diritaj kun granda boneco, enhavas en si pikan riproĉon, li ordonis al la sklavo tuj veturi plu.

La monaĥo salutis la vilaĝanon Devala kaj komencis helpi lin en la rebonigo de la veturilo kaj en la kolektado de la disŝutita rizo. La afero iris rapide kaj Devala ekpensis: — "Tiu ĉi monaĥo devas esti sankta homo, al li kvazaŭ helpas nevidataj fortoj. Mi demandas lin, por kio mi meritis tian severan agon de la fera bramano." Kaj li diris: — Estimata sinjoro! Ĉu vi ne povas diri al mi, por kio mi suferis malhonestecon de tiu homo, al kiu mi neniam faris malbonon. La monaĥo diris:

— Aminda amiko, vi ne suferis malhonestecon, sed suferis en la nuna vivo tion, kion vi faris al tiu ĉi bramano en la antaŭirinta vivo. Kaj mi ne eraras, se mi diros, ke eĉ nun vi farus al la bramano tion saman, kion li faris al vi, se vi estus je lia loko kaj havus tian fortan servanton.

La vilaĝano konfesis, ke se li havus potencon, tiam li agus kun la homo, kiu barus al li la vojon, tiel same, kiel la bramano kun li.

La rizo estis jam kolektita en la veturilon kaj la monaĥo kun la vilaĝano alproksimiĝis al Benareso; subite la ĉevalo forsaltis flankon. — Serpento! serpento! — ekkriis la vilaĝano. Sed la monaĥo, ekrigardinte atente la objekton, kiu timigis la ĉevalon, desaltis de la veturilo kaj ekvidis, ke tio ĉi estis monujo, plena da oro. — Neniu alia, krom la riĉa juvelisto, povis perdi tiun ĉi monujon, li ekpensis, kaj, preninte la monujon, li donis ĝin al la vilaĝano, dirinte: — Prenu tiun ĉi monujon kaj kiam vi estos en Benareso, alveturu al la hotelo, kiun mi montros al vi, demandu je la bramano Pandu kaj redonu al li la monujon. Li petos de vi pardonon por la maldelikata agado kun vi, sed diru ke vi pardonis al li kaj deziras al li sukceson en ĉiuj liaj entreprenoj, ĉar, kredis al mi, ju pli brilantaj estos liaj sukcesoj, des pli bone estos por vi. Via sorto en multaj rilatoj dependas de lia sorto. Se Pandu deziras klarigojn, tiam sendu lin en la monaĥejon, kie li ĉiam trovos min preta helpi al li per konsilo, se li bezonas konsilon.

Pandu alveturis dume Benareson kaj renkontis Malmekon, sian amikon, riĉan bankieron. — Mi pereas, — diris Malmeko, — kaj neniam komercajn aferojn povos fari, se mi ne aĉetos hodiaŭ veturilon da bona rizo por la reĝa kuirejo. Mi havas en Benareso unu malamikon bankieron, kiu eksciiginte, ke mi faris kondiĉon kun la reĝa palacisto, ke mi devas liveri al li hodiaŭ matene veturilon da rizo, kaj dezirante min pereigi, li forĉetis la tutan rizon en Benareso. La reĝa palacisto ne liberigos min de la kondiĉo, kaj morgaŭ mi pereos, se Kriŝno ne sendas al mi anĝelon de la ĉielo.

Dum Malmeka plendis je sia malfeliĉo, Pandu ekvidis ke lia monujo perdiĝis. Serĉinte en sia veturilo kaj ne trovante ĝin, li suspektis sian sklavon Magaduton en la ŝtelado kaj tial li alvokis la policistojn, kulpigis Magaduton kaj, ordoninte lin ligi, severe turmentigis lin por devigi sin konfesi. La sklavo kriis, suferante: — Mi ne estas kulpa, lasu min! Mi ne povas elteni la turmentojn! Mi tute ne estas kulpa je tiu ĉi krimo kaj nur suferas por la pekoj de aliaj! Ho, se mi povus peti pardonon de tiu vilaĝano, al kiu mi faris malbonon pro mia mastro! Tiuj ĉi turmentoj estas puno por mia krueleco.

En tiu tempo, kiam la policistoj daŭrigis ankoraŭ bati la sklavon, la vilaĝano venis al la hotelo kaj, al la miro de ĉiuj estantoj, redonis la monujon. La sklavon oni tuj liberigis de la turmentigantoj, sed, ne estante kontenta de sia mastro, li forkuris de li kaj aliĝis al bando de rabistoj, loĝantaj inter


la montoj. Kiam do Malmeka ekaŭdis, ke la vilaĝano volas vendi bonegan rizon, kiu taŭgas por la reĝa tablo, li aĉetis la tutan rizon por triobla prezo, kaj Pandu, ĝojante pri la trovo de la mono, tuj rapidis en la monaĥejon, por ricevi de la monaĥo tiujn klarigojn, kiujn li permesis al li. Narada diris al li:

— Mi povus doni al vi klarigojn, sed sciante, ke vi ne estas kapabla por kompreni la spiritan veron, mi preferas silenti. Tamen mi donos al vi komunan konsilon: Kondutu kun ĉiu homo tiel same, kiel kun si mem, servu al li tiel same, kiel vi volus ke oni servu al vi; en tia okazo vi semos semon de bonaj aferoj kaj la riĉa rikolto sendube ne evitos vin.

Ho monaĥo! donu al mi klarigojn, — diris Pandu, — kaj tiam estos por mi pli facile sekvi vian konsilon. Kaj la monaĥo respondis: — Aŭskultu min, mi donos al vi ŝlosilon al la sekreto: se vi ne komprenas ĝin, kredu tion, kion mi diros al vi. Kalkuli sin por aparta ekzistaĵo estas eraro, kaj tiu, kiu direktas sian prudenton, por plenumi la volon de tiu aparta ekzistaĵo, sekvas malveran lumon, kiu alkondukos lin en profundajon de pekoj. Tio, ke ni kalkulas sin apartoj ekzistaĵoj, sekvas de tio, ke la vualo de Maja blindigas niajn okulojn kaj malhelpas al ni vidi la nedisŝiritan ligon kun niaj proksimuloj, ĝi malhelpas al ni observi nian unuiĝecon kun la animoj de aliaj ekzistaĵoj. Tre malmultaj scias tiun ĉi veron. La sekvantaj vortoj estu por vi kiel talismano: “Tiu, kiu malutiligas al aliaj, faras malbonon al si mem.” “Tiu, kiu helpas al aliaj, faras al si bonon.” “Ĉesu sin kalkuli kiel apartan ekzistaĵon — kaj vi surpaŝos sur la vera vojo.” “Al tiu, kies rigardo estas mallumigita per la vualo de Majā, la tuta mondo ŝajnas stranĉita en senfinaj apartaj ekzistaĵoj. Tia homo ne povas kompreni la signifon de la komuna amo al la tuta vivantaro.

Pandu diris: — Viaj vortoj, estimata sinjoro, havas profundan signifon, kaj mi memoros ilin. Mi faris malgrandan bonaĵon, kiu neniom kostis al mi, por la malriĉa monaĥo kiam mi veturis Benareson, kaj jen kiel favore montriĝis ĝiaj sekvoj. Mi multe estas al vi ŝulda, ĉar sen vi mi ne sole perdus mian monujon, sed ne povus ankaŭ efektiviĝi en Benareso tiujn komercajn aferojn, kiuj multe pligrandigis mian staton. Krom tio via zorgemeco kaj la alveturo de la veturilo kun la rizo helpis al la bonstato de mia amiko Malmeka. Se ĉiuj homoj eksciis la veron de viaj reguloj, kiel pli bele estus nia mondo, kiel malgrandiĝus la malboneco kaj grandiĝus la komuna bonstato! Mi dezirus, ke la vero de Budho estu komprenata de ĉiuj, kaj tial mi volas fondi monaĥejon en mia patrujo Kolŝambo, kaj invitas ankaŭ vin viziti min, por ke mi povu dediĉi tiun ĉi lokon por la frataro de la lernantoj de Budho.

(Daŭrigo.)



Friponaĵo. Studento eniras en drinkejon, kie li ekvidas sian kreditoron, tajloron.

— Estas vera friponaĵo tio, kion vi faras!

— Kial do? — demandas la tajloro terure.

— Vi manĝas tie ĉi kokinan viandon kaj salaton, — vi trinkas bonegan vinon, — por tiuj ĉi vi havas monon!... sed vi tamen ĉiutage persekutas min pro la dek markoj, kiujn mi ŝuldas al vi. (El la “Libro de l’ Humoro“.)

La estinteco. — Ĉu vi efektive ne edziĝos je fraŭlino Terezio? ŝi estas ja riĉa, kaj ankaŭ ne malbela.

— Sed ŝia estinteco...

— Mi certigas vin, ke ŝia estinteco estas senmakula kaj pura.

— Ho amiko, tion ĉi mi kredas; sed ĝi estas tre *longa*.

(El la “Libro de l’ Humoro“.)

La nova ĉapelo de Mrs Barnley.

La aĉeto de nova ĉapelo estis ĉiam epoko en la vivo de mrs Barnley kaj estis konsiderata de ŝi kiel tre grava okazo.

Tiuj virinoj, kiuj havas eblon aĉeti kelkajn ĉapelojn ĉiujare, ne povas imagi al si, kia embaraso la aĉeto de tiela vestaĵo estas por tiuj, kiuj, simile al mrs Barnley, ne havas eblon aĉeti pli ol dudekon dum tuta sia vivtempo.

Ŝi povis klare rememori al si ĉiun apartan el la siaj, kaj ŝi povis en sian memoron revoki ĉian detalon de ilia formo kaj ankaŭ de ilia ornamaĵo, la kosto, kiun ili prenis, la specialajn cirkonstancojn, sub kiuj ili estis aĉetataj kaj la okazoj, kiam ili estis uzataj je la unua fojo. Unue estis la simpla pajla ĉapelo kun rozruĝaj rubandoj, kinn ŝi havis estante infano, poste la verda silka kufo kiun havis ŝi, juna knabino; la ĉarma blanka silkĉapelo kun helruĝaj rozoj, kiun ŝi portis fianĉino, unu aŭ du pli simplaj poste, kaj laste la krepan ĉapelon, kiun si ekprovizis al si, kiam ŝi portadis funebran veston pro sian formortinta Jones.

Ŝi sendube povus posedi pli multajn, sed kaj ŝi kaj Jones estis ŝparemaj kaj preferis la agrablan certecon pri plikreskanta enkalkulo en la ŝparbanko ol luksan veston. Kiam ili vidis, ke iliaj najbaroj permesis al si ian superfluon, mr kaj mrs Barnley konsolis sin reciproke per tiu certeco.

Sed la daŭrebleco havas siajn limojn, precipe rilate al ĉapeloj, kaj nun, kiam dekkvin jaroj estis pasintaj post la morto de Jones, dum kia tempo la krepa ĉapelo deĵoris en ĉiuj vizitoj en la preĝejo kaj en ĉiuj entombigoj, mrs Barnley havis la intencon ekprovizi al si unu novan. Kaj kiam la lumaj tagoj printempaj alvenis kaj ĉiu arbo kaj arbeto sin vestis per nova ornamvesto, mrs Barnley prenis sian decidon.

Mi estis unu el ŝiaj proksimaj najbaroj, kaj ŝi konfidis al mi siajn planojn kaj petis ke mi helpu al ŝi elekti indan postsekvanton al la krepa ĉapelo. Kelke da tagoj post tio ni veturis en Layton por tiu ĉi celo. Nia estado en la malgranda modejo de miss Basett neniel estis mallongedaŭra. Kun kiom da firmeco kvankam mrs Barnley kontraŭstaris ĉiujn tentojn de la modo kaj novecoj, kiam ŝi do tamen estis jam konvinkinta sin pri tio, ke nova ĉapelo efektive estas necesa afero kaj ke la aĉeto de tia ne kontraŭbatalas ŝiajn principojn de ŝparemeco, ŝi estis tiom interesata pri la aĉeto kiel eĉ kiu ajn kaj tre postulanta, ke la nova ĉapelo estu kaj laŭmoda kaj belkonvena.

Ĉar mi bone sciis, ke, kiam oni estas petita por helpi al siaj amikoj elekti, ili deziras nur aŭdi la aprobadon de sia elekto, mi diris nur malmulte kio povus influi ŝian decidon. Sed kiam ŝi fine decidiĝis pri unu nigra ĉapelo kun granda ĝirlando de helruĝaj burĝonoj de dornrozoj, mi kuraĝis rediri, ke ĉar ŝi estis portinta krepon tiom longtempe, estis pli konvenonta elekti florojn de ia alia koloro.

— Ne, diris ŝi, mi nun formetas la funebron, mi formetas ĝin, kaj tiam mi ne toleras duonmezurojn. Mi volas bonan kaj konvenan ĉapelon, kiu povos esti tiom uzebla post tri, kvar jaroj kiel ĝi estas nun, kaj tiu ĉi laŭ mia opinio estas tre konvena. Ĉirkaŭe je unu semajno post nia alesto ĉe miss Basett mrs Barnley venis viziti min. Ŝi elvidis malĝoja kaj ĉagrenita.

— Ho, tiu ĉapelo, ekdiris ŝi, mi estas tiel terure malĝoja, ke mi ĵus nun ĝin aĉetis.

Mrs (elparolu: missis) = sinjorino; *miss* = fraŭlino; *mr* (elparolu: mister) = sinjoro.

— Kial? — ĉu ĝi ne plaĉas al vi?

— Kontraŭe, ĝi tre plaĉas al mi, sed mi estas malĝoja, ke mi ĵus nun aĉetis ĝin. Mi edziĝos, aŭdu. — Jes, post du semajnoj mi edziĝos, daŭrigis ŝi, kun mr Amos Taylor, kaj tiu ĉapelo estas ja tute nova, kaj mi devas tamen ekprovizi al mi ankoraŭ unu. Mi uzis ĝin du fojojn, kaj sekve ĝi ne konvenas kiel edziĝa ĉapelo, kompreneble. Estas tre malbona antaŭprikalkulo, tre malbona.

Post kiam ni longe preparolis la demandon rigarditan de tiu malgaja punkto de vido, ĝi alprenis proporciojn malpli terurajn, kaj ŝi komencis vidi la aferon el pli luma flanko.

— Mrs Bennet, diris ŝi, ĉu vi pensas, ke estus ridinde, tute ridinde, se mi uzus tiun ĉapelon, malgraŭe? Ŝajnas al mi tiel bedaŭre domaĝa ke mi tute ne havus utilon de ĝi.

Mi certigis al ŝi, ke mi opiniis, kontraŭe, ke tio estus saĝa, kaj iom post iom ŝi komencis opinii tiel same.

Kiam mi gratulis mr Amos Taylor pri lia fianĉiĝo, mi kuraĝis observigi, ke estas domaĝo ke tio estis prokrastita tiel *longe*.

— Jes, mrs Bennet, respondis li, tiel mi pensas mem; sed kiel mi povus do fari, dum kiam mi vidadis tiun krepan ĉapelon je ĉiu dimanĉo aperi en la preĝejo? Ĉu ne estis ligitaj miaj manoj aŭ, pli ĝuste dirite, mia lango? Ĉar laŭ mia penso ne povas viro kun iom da prudento kaj sento svati virinon, dum kiam ŝi portas funebrojn pri alia. — Rilatas tiel, mrs Bennet, ke mi havas mian teorion pri tiu ĉi afero, kaj tio estas, ke la ĉapelo de virino estas speco de termometro, laŭ kiu oni povas prijuĝi ŝiajn sentojn, kaj kiam mi ekvidis en la lasta dimanĉo tiujn helruĝajn florojn, mi diris al mi mem: Amos, nun estas tempo por vi! Jes, mrs Bennet, mi atendadis tiun ĉapelon jam dum dekkvin jaroj.

Tradukis **Paul Nylén**.

ANONCOJ.

Mi havas la honoron sciigi amikojn esperantistojn, ke mi akceptas mendojn de la plej diversaj specoj da presajo en la lingvo Esperanto por presejo esperantista en Hungarujo. Tiu ĉi presejo plenumas ĉiujn mendojn de esperantistoj dum mallonga tempo kaj prenas la plej malgrandan pagon. Ĝi rekomendas al Vi vizitkartojn (kun la transsendo per pakajo rekomendita — 90 kop. por cento), leterpaperojn, kortojn, poŝtkartojn, librojn, anoncojn kaj cet. Mi sendas al ĉiu volante la detalan anoncon en Esperanto post la ricevo de poŝtsigno en 3 kop. Por la respondo volu almeti poŝtsignon.

Mia adreso: Rusujo. St. *Ŝestilino*, Rybinsko-Bologovskoj ŝel. dorogi. Selo *Vereteja*. al **Ivan Ŝirjaev**.

Signetoj esperantistaj (kun pinglo aŭ kun ringeto) riceveblaj de juvelisto **H. Ŝtalberg**, Rusujo, Estl. gub., *Vezenberg*, Peterb. str. 97.

Prezo de la arĝenta: rubl. 1,50, de la bronza: rubl. 0,50. Transsendo aparte, en Rusujo de 14 kop. en alilandojn de 20 kop. komencante. Oni povas pagi ankaŭ kun mono alilanda, sed se pöveble mi petas elekti monon anglan, francan, germanan, svedan aŭ unuig. ŝtat. amer.

Anoncaj agentoj!

Ni deziras anoncajn agentojn.

Sin turnu al

Ekspedejo de Lingvo Internacia

Luleå (Svedujo).